

# Alparolo de Tavoleta urbestro

Mi bonvenigas varme vin ĉiujn, gesinjoroj, en la nomo de la komunuma administrantaro. Apartan dankon al prof. *Sachs*, kiu organizis ĉi tiun eventon kaj laboras kun grandega sindonemo por kreskigi la nombron de la fakuloj pri Esperanto. Prof. *Sachs* diris al mi, ke ĉi tiu renkontiĝo antaŭas alian, pli gravan, kiu okazos en Florenco dum la venontaj tagoj, engaĝante grandan parton de la fakuloj de tiu lingvo.

Estas honoro por Tavoleto gastigi ĉi tiun celebradon, kiu, malgraŭ la malpli granda nombro de partoprenantoj, havos sendube eminentan kvaliton. Aldone al ĉi tiu bonveno mi deziras prezenti al vi tiun ĉi vilaĝeton, kie troviĝas la "Esperanto-Kasteleto".

La unuaj indikoj pri la fondiĝo de Tavoleto datiĝas el la jaro 800 p.K., kiam la unua kerno estis fondita laŭlonge de la vojo kunliganta la urbon *Rimini* al Urbino kaj komunikiĝanta kun la vojo *Flamina* apud *Calmazzo*. Ĉi tiu vojo estis difinita "*regalis*" (reĝa) pro sia rimarkinda trafiko, kaj pro tio la senjorioj (tiam tie firmiĝantaj) konsideris ĝin strategia.

La nomo de la vilaĝo devenas el ĝia aktivado, la ekspluatado de arbaroj. El ĉi tiu loko venis la ligno utiligata por la konstruado de la grandaj romanikaj bazilikoj. La unuaj loĝejoj faritaj de la arbaristoj, kiuj tie laboris, estis tuj fortikigitaj kaj tie estis konstruita fortikaĵo de la senjorio *Malatesta* el *Rimini*, kiu uzis ĉi tiun avanpostenon por defendo de siaj teritorioj kontraŭ la kreskanta potenco de la urbo Urbino.

Inter 1435 kaj 1459 Tavoleto estis la centro de multnombraj bataloj inter la senjorio *Malatesta* kaj la senjorio Montefeltro kaj ĝi estis prenita 5 fojojn, ĝis 1459 kiam Federiko de Montefeltro konkeris ĝin definitive, disrompigis la jam kadukan malatestan fortikaĵon kaj ordonis al Francesko (de *Giorgio Martini*) la konstruadon de alia nova kastelo, provizota per 80 militistoj por kontroli la apudajn limojn de



*Rimini*. Poste, la sorto de Tavoleto estis strikte kunligita kun tiu de la duklando Urbino.

Ĝis 1797 ĝi estis sidejo de vikarieco kun jurisdikcio sur 7 najbaraj kasteloj. La 31an de marto 1797 la francaj trupoj, flanke kun jakobenoj, invadis kaj detruis Tavoleton, mortigis 22 homojn kaj realigis ĉiajn specojn de kruelaĵoj. La milita graveco de Tavoleto estis konfirmita ankaŭ dum la lasta mondmilito, kiam ĝi estis unu el la fortikaĵoj de la "Gota Linio". La vilaĝo estis liberigita la nokton inter la 3a kaj la 4a de septembro 1944 fare de gurkaj soldatoj post sanga blankarmila batalo. Tuj post la milito la lando suferis pro elmigrado de pluraj loĝantoj, kiu moviĝis al pli grandaj centroj ĉe la marbordo – dum la lastaj jaroj tio ŝajnis provoki tian malkreskadon de la loĝantaro, ke ĝi povus malaperigi la vilaĝon. Bonŝance, de kelkaj jaroj tiu tendenco tute inversiĝis: estas kresko de la loĝantaro kaj konstanta reokupo de la domaro, ankaŭ en ĝia historia centro. Inter la domoj en situacio de rekupero estas ankaŭ *Palazzo Petrangolini*, kiu nuntempe tamen ne estas ankoraŭ utiligebla.

El ĉi tiuj indikoj oni komprenas, ke la historio de Tavoleto estas tiu de limlando, de loko, en kiu kunfandiĝas kulturoj de konverĝantaj teritorioj. Kulturo de sintezo, kiu kolektas kaj ree prilaboras la kulturajn malsimilaĵojn de malsamaj popolacioj. Tio estas sendube karaktero kiu similigas ĝin al Esperanto, kiu kunmetas plurajn eŭropajn lingvojn sen altrudo de unu el ili al la aliaj. Sendube la metodo de sintezo ludas alproksimigan rolon kiun ni ĉiuj devas uzi en ĉiuj aferoj rilatantaj al la homa vivo por lerni kunvivadon anstataŭ superfortado.

La komunuma estraro restas je plena dispono por apogi iniciatojn kiel ĉi tiu, kiu povas sendi pozitivajn signojn kaj povas ekkonatigi nian malgrandan realon al pli vasta publiko. Mi opinias, ke similaj okazaĵoj povus esti proksimaj – sen atendi venontan centjar-revenon!



*Palazzo Petrangolini*
Tavoleto (PU), Italio

Mi finas bondezirante al mi kaj al vi renkontiĝon por ĉiuj en tre proksima estonto kaj ke ni povu gastigi eventojn kiel ĉi tiun en pli vasta kaj meritoplena kadro, kia povus esti la Kastelo en Tavoleto, *Palazzo Petrangolini*.

Saluton kaj bondezirojn pri bona laborado, bonan restadon al vi ĉiuj kaj apartan dankon al prof. *Sachs*.

*D-ro Mauricio* PAOLUCCI,
urbestro de Tavoleto